Kursanino de Lorenz Běla Raichlová el Náchod skribis al ni: „Kun ĝojo mi legis pri bona amiko de mia juneco, kun kiu mi interrilatadis en laboristaj kunvenoj U Pštrosů en jaro 1889/90. En kultura rondeto, kiun gvidis studentoj, ankaŭ Lorenz estis aktiva, instruante nin Volapük, sed tuj, kiam atingis lin informoj pri Esperanto, li komencis labori por ĝi. Li do efektive estas la unua propagandanto de E. ĉe ni. Li estis tre bona kamarado, de alta inteligenteco, kaj mi dankeme memoras lin. — Mi restis fidela al mia Esperanto kaj ankaŭ al grandaj ideoj de Lorenz, kiu gvidis min al profunda kompreno de la humaneco.“ Tre ĝojigis nin tiu ĉi karto de maljuna fidela samideanino. Jes, ekzistas interna ideo, kiu kunigas nin ĉiujn dum niaj tutaj vivoj kaj kiu igas nin resti fidelaj al idealo eduki homon por kompreno, ke valoras vivi kiel homarano, kiu rigardas ĉiun nacianon egalrajta. KREDU al ni: kvankam tiom simpla laŭvorte, ĝi estas idealo granda kaj malfacila por efektiviĝi.

Unua tutslovaka Esperanto-kongreso estis en Turčiansky Svätý Martin la 12—13-an de julio. Malfermis ĝin J. V. Dolinský per parolado, en kiu li akcentis la kvardek jarojn depost apero de la slovaka Fundamento-traduko de Ŝkarvan kaj Evstifejev. Li transdonis prezidaton al s-o Pavol Rosa, kiu gvidis jarkunvenon de SES. Krom ĉeestantoj el ĉiuj anguloj de Slovakujo venis gastoj el Ostrava-regiono kaj el E. Klubo en Praha. Estis elektitaj: prezidanto Pavol Rosa, sekretarioj Imrich Zálupský, redaktoro el Bratislava, kaj Imrich Havaš, studento el Hont. Tesáry. Honora prezidanto estis elektita J. V. Dolinský, honora membro MUDr. L'udovít Izák. La nova komitato estu salutita den i plej sincere! (Laŭ Esperantisto slovaka.)

Esperanto en la junularaj gazetoj de Slovakujo. La sinteno de la slovaka junulara gazetaro al Esperanto estas tre favora. Dum niaj ĉeĥaj skoltofratuloj vane klopodas por enkonduki Esperanton en sian organon, nia monata skoltorevuo „Slovenský Junák“ publikigas jam la 5-an lecionon de la kurso, gvidata de senlaca fratulo L. Ozábal. — La duonmonata revuo por mezlernejanj „Plamen“ publikigas en sia februara numero tutpaĝan artikolon „Skauting a Esperanto“. La redaktoro promesis, ke por kontentigi la deziron de multaj legantoj oni publikigos, post solvo de la prestipa problemo, Esperanto-kurson. — Tre interesan metodon uzas la gvidanto de la Esperanto-kurso en la duonmonata gazeto por

infanoj „Priatel' dietok“. Por fari la kurson alloga por la malgranduloj li instruas per fabelo, ilustrita per desegnaĵoj. — Ambaŭ revuoj havas ankaŭ skoltan angulon. (Maljuna Urso.)

Centra ekspozicia komitato en Kroměříž, kies ĉefdirektoro estas verkisto Jindřich Spáčil, konsentas labori por la ekspozicio „100 jaroj de la ĉeĥa nacia vivo“, laŭ iniciato kaj intervenoj de s-ano J. Hoffner, en Esperanto. EK Brno proponis sian helpon, laboris kaj plu laboros por la sukceso de l'ekspozicio kaj anoncas aperon de prospektoj en eldonnumero 10.000, kiuj estos aldonitaj al „Esperanto“.

Saluton! Belega broŝureto 16-paĝa kun eminenta teksto de Ludmila Kolářová kaj ĉarmaj bildoj de Karel Pekárek en bonega traduko anonima, kiun ni anoncis sur paĝo 58, jam aperis ĉe Orbis en Praha. Ĝi en fejetona stilo rakontas telegrafmaniere pri ramirkindaĵoj de Ĉeĥoslovakio por instigi la vizitinton al rememoro kaj la nevizitinton al vizito de nia lando. Ne estas trovebla io riproĉinda. Aperigo de tiu libreto, bibliofilia aranĝita, en eldonejo Orbis jam pro la fakto mem signifas gravan rekonon de uzebleco de Esperanto por duonoficiala propagando. La kajereto estas bonega donaco al Via fremdlanda amiko. Vi povas ricevi ĝin po 15 Kčs de nia Librovendejo. Mendon sendu sur poŝta paĝilo al numero 12 371 „Svaz esperantistů ČSR, účet knižkupectví, Praha“.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo. Al gesinjoroj Forman en Hradec Králové naskiĝis la 23-an de aŭgusto 1947 filo Vladimír. Li fariĝis samtempe membro de Esperanto Asocio en ĈSR kiel plej juna esperantisto. Koran gratulon al feliĉaj gepatroj!

Mortis f-ino Božena Pouzarová, membrino de EK Hradec Králové kaj EAĈSR, la 29-an de julio pro malfeliĉa akcidento dum banado. Ŝi estis nur 21-jara. Ŝia korpo estis cindrigita la 5-an de aŭgusto en Pardubice. Ŝiaj gepatroj akceptu sinceran kondolencon de ĉiuj, kiuj ŝin konis.

En České Budějovice mortis nia malnova membro s-ro Vojtěch Matouš, komercisto. La entombigo okazis la 22-an de aŭgusto. Honoron al lia memoro!

Elmi Tamminen el Helsinkí sendas salutojn al ĉiuj siaj geamikoj en Ĉeĥoslovakio.

Nuni Nanev, bulgara kantisto (tenoro), membro de opero en Sofia, vivanta nun en Olomouc, entuziasma esperantisto, preparis programon por siaj aŭtunaj koncertoj, en kiu estas enmetitaj kantoj en esperantaj tekstoj. La ceteraj kantoj estas prezentataj ĉeĥe, itale, ruse. Li estas kantisto de malofta talento. Lia koncerto signifos faron artistan kaj signifos samtempe faron por pravi kanteblecon de Esperanto al fakuloj kaj amantoj de kanto. Ni tre rekomendas al niaj legantoj helpi en aranĝo de Nanev koncerto en siaj lokoj. Turnu sin pri kondiĉoj al s-ro Nuni Nanev en Olomouc, Stalinova 32.

Překlad úkolu 8. poslal také p. Fr. Ryba z Chlumce nad Cidlinou, překlad úkolu 10. pp. Franta Schwarz ze Sezimova Ústí a Ing. Lad. Krajč z Tábora. Byly to vesměs práce velmi pěkné, jejich autoři přijměte náš dík a odpuště, že jsou registrováni až dodatečně.

RICEVITAJ GAZETOJ (dua listo):

Gazetoj, ĉe kiuj estas notita abonsumo en Kčs, estas mendeblaj por tiu sumo ĉe Librovendejo de EAĈSR.

The British Esperantist. 140 Holland Park Avenue, London W. 11.

Denaska Esperantistaro. Bulteno multobligata, 6 paĝoj, neregule aperantaj. Sekretariino G. P. Weston D.B.E.A. 27 Cecil Road, London N 10.

Esperantobladet. Norvega Esperantisto. Boks 942, Oslo.

Franca Esperantisto. Organ officiel de l'Union Esperantiste Française 34, rue de Chabrol, Paris 10-e.

Helena Esperantisto. Athinai, 23, str. Rodou.

Jugoslavia Esperanto-Gazeto, oficiala organo de jugoslavia Esperanto-movado. Zagreb, Neznane Junakinje 1/III.

La Juna Vivo. West-Graafdiijk, Nederlando. Kčs 30.—.

Kangurua Letero. Aperas monate. Sendis E. W. Chandler, Crowes Nest, Australio. Multobligata. Portempe anstataŭas Aŭstralian revuon.

Malgranda Revuo. Eld. Stellan Engholm, Ludvika, Svedujo.

Nederlanda Esperantisto. Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid.

New Zealand Esperantist, senpaĝa organo por la membraro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, 6 Clifford Street, Karori, Wellington, W. 3.

Studenta Fronto. Internacia studenta gazeto en Esperanto. Sofia, str. Car Ŝišman 11.

Vegetara revuo. Bulteno multobligata. 4 paĝoj. Redaktoro Christian Hougaard, St. Blichersvej 43, Aabyhoj, Danlando. Abono 5 svedaj kronoj jare (12 numeroj).

La Vivo. Monata organo de „Amikoj de la homaranismo“. Red.: E. v. Veenendaal-Bouwens, Limmen (N. H.), Nederlando. Multobligata. Kčs 45.—.

Die Weltsprache, germanlingva revuo por propagando de Esperanto en Austrio. Wien IX. Rossauerlande 27.

NI LEGIS

Literatura mondo finis per sia numero 5-6, veninta al ni en julio, sian duonjaron de la tria periodo. La nivelo estas eminenta. Tradukanto de aventuraĵo armena tre atente studis listojn neologismajn, tial lia lingvaĵo strange diferencas de la enhavo. Kontraŭe traduko de la sceno el „La honorinda stratulino“ estas tiom senpere konversacia, ke vi legas ĝin senspire. Enestas en la kajero du tradukaĵoj el Baudelaire, unu de Waringhien (La vino de l' cifonisto) dua de Kalocsay (La vesperkrepusko), elstaraj poeziaĵoj en originala lingvaĵo tre artismaj. Tiaj tradukaĵoj nepre dokumentas la altan ŝtupon, sur kie Esperanto staras laŭlingve. — En la fino de la kajero konstatas la eldonantoj, ke ĝis nun la nombro de la abonantoj ne sufiĉas por kovri la krudajn preskostojn. Certe venos ankoraŭ pluaj abonantoj. Tamen ni tre rekomendas al ĉiu literaturamanto, ke li abonu Literaturan mondon. Li anoncu sin ĉe nia librovendejo en Praha XIX, Uralské nám. 9. Por jaro ĝi kostas 125 Kčs.

Diverĝa fenomeno ĉe Esperanto-uzado. Ni plene aprobas konstataĵojn de M. S., kiun li faras en „Esperanto“ de julio: „Mi permesas al mi sugesti, ke la plej grava danĝero en la nuntempa stadio de Esperanto estas la kreskanta tendenco doni ĉiam pli novajn signifojn al la sama radikoj. Tiu plureco de signifo karakterizis la frutempan vortprovizon (inkluzive de la Zamenhofa), sed ni ne devas sekvi la vojon de la naciaj lingvoj. Tio ne estas evoluo, sed tio, kion Zamenhof nomis la pereiga disfalo de la lingvo en diversajn dialektojn.“ Certe devus multaj aŭtoroj pli atente foliumi la Plenan vortaron kaj krome eviti homonimecojn.

Gento de Zamenhof. Diras en „Esperanto“ el junio H. J.: „Konvenas hodiaŭ dankeme, memori la genton, al kiu apartenis la Majstro. Pelita, persekutita, premita jam de sia apero en la mondo, tiu ĉi popolo donis al la homaro multon. Multajn ideojn kaj multajn profetojn de grandaj ekkonoj. Tiu ĉi multeco de genioj devenas de nekontestebla kapableco de tiu ĉi gento analizi, t. e. iri ĝis la kerno de la afero. Longa estas la vico de la analizantoj de la homaj estaĵoj kaj faro, kiun donis la juda popolo, nomoj gravuritaj en la libro de la homaro: Mozeo, Kristo, Spinoza kaj multaj aliaj. Ne laste venas Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu kompletigis la instruojn de la grandaj homamantoj per instrumentado de rapida interkompreno lingva.

Enciklopedia vortaro esperanta-germana de E. Wüster, kies kvar unuaj volumoj (A—KOR) aperis siatempe ĉe Hirt kaj Komp., estas denove ricevebla de UEA, unu volumo po 15 ŝilingoj. La manuskripto de la cetera parto ankoraŭ ekzistas kaj laŭ aserto de UEA eldoniĝos post du-tri jaroj. Kiu el niaj legantoj volus aĉeti la aperintajn volumojn, anoncu sin ĉe nia Librovendejo.

„Esperanto simpligita“. Ni ricevis 4-paĝan flugfolion anglan-esperantan, kiu en naive aroganta stilo proklamas, ke la iniciatinto kaj la 17 subskribintoj (inter ili 3 kaj 4 familianoj) uzos anstataŭ supersignitaj literoj la „anglan“ alfabeton, ĉar supersignitaj literoj estas nekultureco, kiu baras disvastigon de Esperanto. Ili proponas v kiel ŭ, q kiel ĉ, x kiel ŝ, y kiel ŝ, j kiel j kaj ĝ, ĥ forigi. Estas eraro jam en la principo mem. La literoj x kaj y neuzataj en la Esperanto-aboco tre utilas kiel simboloj teknikaj. Krome oni povas presi Esperanton uzante anstataŭ supersignitaj literoj h. Pola esperantisto estis tuj post tiu ĉi milito tiel presata, sed sperto montris, ke ĉiu presejo facile havigas al si supersignitajn literojn, ke eĉ ne postulas alpagon al la prestarifo. Plirapida disvastigo de Esperanto ne dependas de reformoj en la lingvo, sed ekskluzive en batalo kontraŭ la homa konservativeco. Ni havas la plej grandan ŝancon, se ni sukcesos trovi kreskantan aplikon de la lingvo en diversaj medioj. Pacienco estas la plej granda kaj bezona virto en nia batalo. La mankon de ĉiu ajn sperto pri nia reala situacio dokumentas tiu ĉi aserto de la aŭtoro (Rev. John Kubacki, Sek. 3114 So. 14th Street, Milwaukee 7, Wisconsin): „Ili estas la presistoj, eldonistoj kaj redaktoroj de esperantaj verkoj, kiuj timas, ke se Esperanto fariĝus presebla per ĉiu kaj ĉie, ili perdus la gajnojn de la monopolo de presado kaj eldonado de presaĵoj. — Ni scias, ke ili tiel nur kamuflaĵas

por sia propra profito.“ Jes, ni estas ruzuloj kaj kaŝas profitdonajn sekretojn.

Tria kongreso de Unuiĝo esperantista de Francujo (39-a nacia kongreso franca) en Versailles, 24—26-an de majo, kunvenigis 190 p. Oni detale diskutis pri memstareco kaj voĉdonrajtoj de „fakoj“. Rimarkinda estas publika agado de la Unuiĝo, precipe aperigo de ABC de Esperanto de Waringhien. Oni raportis pri klopodoj koncerne la jamboreon. Ankaŭ tie estas videbla, ke la skoltoj ne tro atentigas niajn proponojn. Ili estas ĉie tro skoltismaj por voli aŭskulti ion alian. Tio estas tre bedaŭrinde ne sole por ni, sed precipe por skoltaro. (Vidu Franca esperantisto, majo-junio 1947.)

Vegetara revuo. Ciklostilita bulteno, kies „provnumeron“ ni ricevis en julio. Ĝi propagandas vegetarismen radikalan, eĉ ovoj estas proklamataj tre danĝeraj por la homa organismo. Laŭ ni la konfeso de la vegetara dieto devas esti nomata „vegetarulo“, analogie al bonulo, ĉar ĝi estas derivata de radikoj adjektiva „vegetaro“. Do ne vegetaro!

La kvara bulteno de Denaska Esperantistaro (prezidanto Robert Robertson 228 Alexandra Park Road London) enhavas folion kun nebelaj skizitaj bildoj, uzotaj kiel instruilo por infanoj, kiuj lernos Esperanton kiel sian gepatran lingvon. Sur la kvar negrandaj paĝoj ciklostilitaj estas kelkaj kortuŝaj historietoj pri infanoj samideanaj.

Iom da detektiveco. Mia amiko, fervora samideano, kun kiu ni interŝanĝas esperantaĵojn, pruntedonis al mi la 10-an nron de INTERNACIA KULTURO. Foliumante en ĝi, mia okuloj haltis je la titolo: Petr Bezruč: Marĵino Magdon.

Tuj mi rememoris pri la vintro 1935—36, kiam, estante ĵus studanto de la kvina klaso gimnazia, mi studadis la klasikan Zamenhofan Fundamenton kaj ekzercis mian scion pere de legado en la lernolibro de Šupichová „Legu kaj parolu“. Kaj nun mi fermetis la okulojn kaj ekprovis, ĉu mi ankoraŭ povos diri la iam laŭmemore ellernitan „Marĵino Magdon“, en la konata bonega traduko de St. Schulhof.

Maljuna Magdon el Ostrava hejmen iris vespere kaj haltis je brando...

Mi ne povis daŭrigi, ĉar pasis jam pli ol dekunu jaroj depost tiu tempo, sed ĉiam ankoraŭ sonas la ritmo de la poemo en miaj oreloj. „Nu, ni vidu, kiu tradukis ĝin por la dua fojo kaj kiel, ĉu li estas pli granda majstro ol estis St. Schulhof.“ Mi legas — kaj jen:

Maljuna Magdon el Ostrava hejmen iris vespere kaj haltis je brando...

Mi saltleviĝas kaj kuras trovi „Legu kaj parolu“, kiu mi sukcesis savi malgraŭ la militaj okazintaĵoj kaj kelkaj transloĝiĝoj. Mi malfermas la libron sur la paĝo 149 kaj komparas. Kaj jen, la teksto de ambaŭ tradukoj kuras paralele, nur 8 (ok) etaj malsamaĵoj diferencigas la „Novan“ tradukon, sub kiu troviĝas skribite „El la ĉeĥa originalo tradukis Jaromir Pavlacký“ de la traduko de St. Schulhof. Jen la diferencoj:

	Schulhof:	Pavlacký:
verso 6:	ekspiris	pereis
” 8:	pleje plejaĝa	pleje - plejaĝa
” 24:	Frydek'on	Frydek'-on
” 37:	maldekstren kaj	maldekstren - kaj
” 38:	kaptiĝis	kroĉiĝis
” 40:	Di'	Dio
” 43:	memmortigintaj	memmortiĝintoj
” 44:	kuŝas eĉ tie	kuŝas ĉi tie

Estas evidente, ke jen mi (kaj certe ankoraŭ kelkaj spertos la samon) per tio ĉi trovis ion, kio devis ne okazi. Ekzistas tri eblecoj: 1. s-ano Pavlacký estas samgenia kun St. Schulhof; 2. eraron kaŭzis la redakcio de IK; 3. la teksto en IK estas simpla plagiato. Bedaŭrinde, la tria ebleco estas tiel evidenta, ke estas malfacile kredi ion alian. Cetere la legantoj bonvolu preni „Legu kaj parolu“, paĝo 149, kaj kompari kun Internacia kulturo, n-ro 10 (Junio 1947), paĝo 5, kaj juĝi mem. EVT.

KELKAJ INFORMOJ DE NIA LIBROSERVO

Adreso: Ĉiun mendon kaj ĉiujn korespond-aĵojn direktu sole al adreso de nia provizora Centra oficejo en Praha XIX, Uralské nám. 9.

Plenumo de mendoj okazos ĉiam laŭeble plej rapide. Dum somero okazis prokrastoj, ĉar libertempis ankaŭ niaj eksterlandaj eksped-ejoj. Estu paciencaj, iam elvendiĝas nia stoko (Fabiola ktp.), la bindisto ne liveras sufiĉe rapide (Ĉeĥoslovaka Antologio ktp.), ni devas serĉi en malproksimaj landoj (Kompleta gramatiko de Fructier ktp.), la presisto ne liveras (UNO-deklaroj ktp.) kaj aperas ankaŭ aliaj malfacilaĵoj, kiujn ni tamen ne povas klarigi al la mendantoj ne sukcesante skribi la necesajn centojn da le-teroj kaj... ŝparante afrankon.

Pagu ĉion al nia poŝtĉeka konto. Laŭeble al n-ro 12.371 „Svaz esperantistů ČSR. Účet knihkupectví. Praha“ ne al n-ro 9.602 „Svaz esperantistů ČSR, Praha“. La pagilon vi ricevos en ĉiu poŝtofiĉejo por 15 heleroj.

Katalogo de libroj haveblaj ni ne povas eldoni, ĉar nia stoko konstante ŝanĝiĝas. Pri novaj akiraĵoj ni klopodas atentigi per nia re-vuo. Atentu ankaŭ la recenzojn, la recenzitajn librojn ni povas liveri, se estas tie notita prezo en Kĉs.

Eksterlandajn eldonaĵojn, se ili estas haveblaj, ni povas liveri por originalaj prezoj. Ni liveros aŭ el Praha aŭ ni aranĝas, ke vi ricevu el eksterlando. La pagon vi sendos al ni laŭ nia fakturo (aŭ pagilo kun notita prezo) ricevota.

Maloftajn eldonaĵojn ni havas ankaŭ mul-tajn, sed regule po 1 ekz. Tial ni ne povas pre-pari liston. Sendu al ni nomaron de libroj dezir-ataj kaj vi ricevos tuj, se ni ion el ili havas.

Tuj aŭ baldaŭ ni povas liveri:

	Prezo Afranko	
	Kĉs	Kĉs
Lernolibroj k. a.:		
Lernolibro Th. Kilian	39.—	2.40
— J. Ŝupichová	20.—	2.40
— Ed. Kühnl (sole 2—3)	40.—	2.40
— Žďárský-Procházka (sole 2-3)	40.—	2.40
J. Ŝupichová, Hovoříme esperantsky	28.—	2.40
J. Ŝupichová, Zajímáte se o espe-ranto? 96 pĝ 11×14	6.—	—.60
Collinson, Esperanto a jeho kriti-kové, 24 pĝ 15×22	2.—	—.60
Svaz národů o esperantu, 42 pĝ 12×16	5.—	—.60
Na obranu esperanta, 36 pĝ 12×20	2.—	—.60
Dr. T. Pumpr, Česká a sloven-ská literatura v esperantu, 8 pĝ 14×21	2.—	—.60
Krátké uvedení do Esperanta 4 pĝ 21×30	1.—	—.60
	100 ekz.	70.— 11.—
Leterpaperoj kun kovertoj (espe-ranta stelo kun teksto) 1 ekz.	—.60	
	100 ekz.	60.— 2.40

Poŝtkartoj	1 ekz.	—.20
Poŝtkartoj »Printempan saluton!« de Toyen	1 ekz.	—.70
Glumarkoj, malgrandaj, saketo	80—100 ekz.	12.—

Ŝildo ESPERANTO PAROLATA, emajlita 14×5		32.—
Insignoj, verda stelo sur blanka fundo 8 mm, por pli grandaj kvantoj rabato		12.—

Gazetoj:

Heroldo de Esperanto	100.—
Literatura Mondo	125.—
Internacia Kulturo	110.—

Vortaroj:

nun ne estas haveblaj, sed vi legos pri ili baldaŭ en nia revuo. Vidu p. 88.

Literaturo:

J. Sumín-R. Svobodová, Du noveloj. 82 pĝ 14×19 bind.	19.—	2.40
Lad. Vladyka, Mi en li. Kriminal-romano. 194 pĝ 14×19 bind.	30.—	4.—
Dr. Stan. Kamaryt, Filozofia vortaro. 170 pĝ 13×18 bind.	30.—	4.—
K. M. Čapek-Chod, Noveloj. 86 pĝ 14×19 bind.	19.—	2.40
Petro Den, Kiel fariĝi kreanto facile kaj rapide, 230 pĝ 14×19 bind.	30.—	4.—
Jan Vrba, Homo de Dio. Roma-neto. 112 pĝ 15×21 bind.	19.—	2.40
Vilém Werner, Homoj sur flog-glacio. Komedio. 110 pĝ 15×21 bind.	19.—	2.40
Karel Čapek, La blanka malsano. Dramo. 100 pĝ 15×21 bind.	36.—	2.40
	broŝ.	25.— 2.40
Saluto el Ĉeĥoslovakio. 16 pĝ 10.5×15	15.—	
Luksa libreto kretpapera. Sur ĉiu paĝo bildoj en 5 koloroj.		
J. Wolker, Balado pri okuloj de hejtisto. 20 pĝ 15×21	5.20	1.20
J. Vrchlický, Nokto en Karlův Týn. 74 pĝ 13×20	6.60	1.20
Ginz-Kamaryt, Ĉeĥoslovaka Antologio. Multaj ilustraĵoj. 466 pĝ 15×24	broŝ. 220.—	
	bele bind. 280.—	
Kalocsay, Eterna Bukedo. 352 pĝ 12×19	broŝ. 110.—	
Munthe, Romano de San Mi-chele.	broŝ. 150.—	
Baur, Svisa Antologio.	broŝ. 220.—	
	bind. 255.—	
Aug. de Silva, Vivo de Zola, 108 pĝ 13×20	20.—	1.20
Novaj eldonaĵoj (recenzo sekvos):		
Thijssen, La nevenkebla ĝeno. El nederl. trad. F. Faulhaber 320 pĝ 13×19	bind. 93.—	4.—

ESPERANTO V CIZINĚ

- G. J. Degenkamp, Esperanto sesdekjara. Skizo pri le evoluo de la lingvo literatura.
60 pĝ 15×24 broŝ. 24.60 2.40
kart. 33.— 2.40
- Kardinalo Wiseman, Fabiola. Rakonto pri kristan. katakomb. en Romo. Ilustrita. 436 pĝ
broŝ. 86.—
bind. 135.—
- Sienkiewicz, Kaptitaj en Nubio. 120 pĝ broŝ. 40.—
- Lud. Kökeny, Populara lernolibro de Esperanto. 64 pĝ 15×20 broŝ. 27.50
- Enkondugo en la kulturon. Instruaj broŝuroj (proks. 24 pĝ 13×18): Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, Vivo kaj arto de Goya, Historio de Usono, La antaŭhistoria arto, La budaismo, Vivo de Nansen, el kiuj la unuaj tri jam aperis. La ceteraj sekvos baldaŭ. 1 kajero 7.—
tuta serio de 6 kaj. 34.—
- V. Pechoč, Praktika konversacio Multobligata. 26 pĝ 21×30 20.— 2.40

Insignoj. Porti esperantan insignon ne estas vana eksterajo, sed grava propaganda laro kaj tial devo de ni ĉiuj. Tamen bonvolu kredi nian sperton, ke propaganda efiko ne estas des pli granda ju pli ampleksa kaj ju pli okulfrapa estas la insigno. Ĉiu reklama fakulo al vi diros, ke signifon havas krome ankaŭ unuformeco. Tial la Asocio lasis fabriki belajn, sed modestajn insignojn (verda stelo sur blanka fundo, diametro 8 mm) kaj ĝi tre rekomendas al ĉiuj amikoj de internacia lingvo akiron kaj portadon. Ni plenumas senprokraste ĉiun mendon. Prezo estas 12.— Kĉs por 1 ekz. afrankite, por pli grandaj kvantoj - almenaŭ 20 - rabato. Mendo plej simpla per poŝta pagilo, havebla en ĉiu poŝtoŝtanco por 15 heleroj kaj plenigota per kontonumero 12-371 kaj nomo „Svaz esperantistů ČSR. Účet knihkupectví, Praha“. Indiku, ĉu vi deziras la insignon sur simpla pinglo, aranĝo por enŝovo en butontruon aŭ kun fermebla pinglo.

UNO-deklaroj denove haveblaj. Ni klopodas rapide plenumi la malnovajn mendojn kaj akceptas novajn, al kiuj tamen bonvolu aldoni almenaŭ koston de la afranko. Pri ĉiu nova eldono de tiuj deklaroj ni devas antaŭe interkonsentiĝi kun UEA. Ne bonvolu do riproĉi la iam ne tujan liveron.

KORESPONDI KUN ĈS. SAMIDEANOJ DEZIRAS:

- S-o Henriko Delaye, 2. R. H. Bileau, **Amiens**, Francio.
S-o Persent, La Motte en Sauterie, **Marceleave**, Somme.
S-o Jean Vast, telegrafisto, rue Voltaire, **Amiens**. Noveldonoj de pm.
S-o Marcel Busquet, 31. Relé Beauvais, **Amiens**. Pl.
F-ino Delisle Le Breton, Place de la Poissonnerie, **Cautances**, Mauche, Normandie.
F-ino Revaux, instruistino, 19, rue Boulet, **Amiens**.
S-o Georg Petz, Radegunderstr. 26, **Gratz-Andritz**, Stirio, Aŭstrio, intŝ. pm., il. pk.
S-o Piet Cleij, Lingestraat. 16-B, **Groningen**, Nederlando, por grupo de junaj geesperantistoj 16—25jaraj.
S-o Phan van Cau, 39 Place de Dakao, **Saigon**, Hindoĉinujo, komercisto, 30-jara, tre interesas pri nia lando.

Oni akceptos junan fraŭlinon, kudristinon, en bona sveda familio. Kondiĉo: ŝi parolu esperante. Informojn petu ĉe Fr. Pytloun, Hradec Králové II, Zamenhofova 1010.

Pozdrav pana presidenta dr. Edvarda Beneše bernskému kongresu, přednesený v zahajovací schůzi p. Janem Gerykem, jednatelem E. klubu v Brně, podle svolení, oznámeného kanceláři presidenta republiky ze dne 20. ledna 1947 číslo č. D. 406/47, zněl: „Pozdravuje Vás náš nynější prezident Československé republiky dr. Edvard Beneš, k němuž lne opravdovou láskou všechen československý lid. Mohu Vám říci, že náš pan prezident sympatisuje s esperantským hnutím.“ Jsme velmi vděční panu prezidentovi za tento projev.

O Československu esperantsky. Dne 18. července odletěl z ruzyňského letiště na pozvání irského Svazu katolických esperantistů prof. Jan Filip z Jičína do Irska, aby proslvil v Dublině několik informačních přednášek o Československu. Potom přednášel též v Anglii a Holandsku. O průběhu cesty přineseme zprávu v příštím čísle.

Josef Vitek opět do Skandinávie. Dne 16. září 1947 odjel opět na sever na základě pozvání skandinávských esperantských svazů a doporučení ministerstva informací známý propagátor Československa Josef Vitek z Hradce Králové, aby navštívil Dánsko, Norsko, Island, Finsko a Švédsko, kde bude přednáseti o životě a práci našeho státu. Jeho pětíměsíční zájezd jistě přinese republice hodně užitku, právě jako jeho loňských 90 přednášek po celém Švédsku. (M. N.)

Programon de la Internacia konferenco pri politikaj, ekonomiaj, intelektaj problemoj de la nuna tempo „Monddebato 1948“ en Parizo dum pentekosto 1948 enhavas Franca esperantisto, numero majo-junio, veninta al ni komence de aŭgusto. Ni raportas pri ĝi pli detale en ĉeflingva parto de nia revuo. La programo estas tro ampleksa, tio igas tre probabla danĝeron de diletantismo. Sed la problemoj diskutotaj estas tiom urĝaj, ke ĉiu opinio pri ili meritas esti aŭskultata kondiĉe, se ĝi ne estas unu el tiuj multaj parolturnoj flugantaj nun tra la mondo parte ĉu sencele ĉu pro volo de potencon tenantoj. Adreso de la organiza komito P. Petit, 34 rue de Chabrol, Paris (10).

KOMERCA ADRESARO

Dum novembro aperos bela esperantista jubilea poŝkalendaro, en kiu estos ankaŭ nomaro de komercistoj sciantaj aŭ uzantaj Esperanton. La poŝkalendaro estos via nombro, bonvolu sendi jam hodiaŭ la mendojn. Adreso: Fr. Pytloun, Hradec Králové II, Zamenhofova 1010, aŭ nia Libro-vendejo.

Mezinárodní sjezdy esperantistů. Letošní v Bernu (26. 7. až 2. 8. 1947) byl v pořadí sjezd 32. a první poválečný. Nemohl být navštíven tak početně jako sjezdy předchozí, poněvadž z mnoha států byla úřady povolena účast jen omezená, často nepatrná, což se týká i ČSR. Dosaďná sjezdy konaly se 1905 v Boulogne-sur-mer (688 účastníků), 1906 v Ženevě (1200), 1907 v Cambridge (1317), 1908 v Drážďanech (1500), 1909 v Barceloně (1300), 1910 ve Washingtonu (357), 1911 v Antverpách (1800), 1912 v Krakově (1000), 1913 v Bernu (1203), 1914 (X.) v Paříži (3739, ve skutečnosti se nekonal, protože pro vypuknutí války účastníci musili se vrátiti domů), 1915 v San Fran-

cisku (163), v letech 1916—19 (4 leta válečná) se sjezdy nekonaly, načež 1920 v Haagu (408), 1921 (XIII.) v Praze (2561), 1922 v Helsinkách (850), 1923 v Norimberku (4963, dosud nejpočetnější), 1924 ve Vidni (3400), 1925 v Ženevě (953), 1926 v Edinburce (960), 1927 v Gdansku (905), 1928 (XX.) v Antverpách (1494), 1929 v Budapešti (1200), 1930 v Oxfordu (1211), 1931 v Krakově (900), 1932 v Paříži (1650), 1933 v Kolíně n. R. (950), 1934 ve Stockholmu (2042), 1935 v Římě (1442), 1936 ve Vidni (854), 1937 ve Varšavě (1120), 1938 (XXX.) v Londýně (1602), 1939 v Bernu (756), v letech 1940—46 (7 let válečných) se sjezdy nekonaly. Tohoto roku pak konal se sjezd v Bernu. — Třikrát už konaly se sjezdy v Bernu (1913, 1939, 1947), dvakrát v Ženevě (1906, 1925), Antverpách (1911, 1928), Vidni (1924, 1936), Krakově (1912, 1931), Paříži 1914, 1932), v Praze jen jednou (1923). sb.

Zemské svazy esperantistů existují v Argentině, Australii, Belgii, Brazílii, Británii, Bulharsku, Československu, Dánsku, Francii, Itálii, Jugoslávii, Holandsku, Norsku, Novozélandsku, Švédsku, Švýcarsku, USA (Spojených státech sev.-amerických). Slabé jsou svazy v Egyptě, Finsku, Flandrech, Řecku, Palestině, Portugalsku, Rumunsku a Uruquayi. Místní spolky jsou ovšem i v zemích, kde nejsou svazy zemské vůbec (celkem v 65 státech). sb.

Esperantské časopisy. Zhoubné následky války pro tisk esperantský dosud nezmizely. Esperantských časopisů je, bohudík, méně (skoro jen třetina), ale jsou většinou, bohužel, také méně hodnotné než před válkou. — Vede kdysi týdeník, nyní dočasně čtrnáctideník „Heroldo de Esperanto“, vydávaný v Scheveningenu (Holandsko) a rozšířený v 54 zemích. Ústředním orgánem je „Esperanto“, spojené orgány ženevského UEA a londýnské IEL (v Rickmansworthu, Anglie), odebíraný v 57 zemích. — Vedle těchto časopisů vycházejí pouze v esperantu měsíčníky (e-o = esperanto, e-isto = esperantisto): Afrika revuo (Casablanca), Espero katolika (Roelfarendsveen, Holandsko), Internacia kulturo (Sofia), La interligilo (Paříž), La juna vivo (West-Gvaftdijk, Holandsko), Pola e-isto (Krakov), SAT-amikaro (Paříž), Sennaciulo (Paříž) a dočasně zastavený La praktiko (Hág). Tedy pouze 10 čistě esperantských měsíčníků a 1 čtrnáctideník. — Pouze esperantské jsou také dvouměsíčníky a čtvrtletníky (5) La familia rondo (Tarlton, Anglie), Literatura mondo (Budapest), Malgranda revuo (Ludovika, Švédsko), Studenta fronto (Sofia), Vojo - vero - vivo (Loonopzand, Holandsko). — Nejvíce (30) je časopisů dvojjazyčných, v esperantu a v jazyce národním, jako jsou český Esperantista (Praha) a slovenský Esperantisto slovak (Trenčín). Z těch je jeden čtrnáctideník, Antaŭen! (Osijek, Jugoslavie), 18 měsíčníků (s čs.) Arbetar e-isten (Stockholm), Argentina e-isto (Buenos Aires), Dansk e-oblade (Kodaň), E-o-bladet (Oslo), Flandra e-isto (Brusel), Franca e-isto (Paříž), Kompreni (Lyon), Komunikoj (Hannover), Laborista e-isto (Amsterdam), La progresanto (Amsterdam), La rondo (Flinders Park), Nederlanda e-isto (Amsterdam), New Zealand e-ist (Wellington), Renovigo (Mexiko), Svenska e-o-tidningen (Stockholm), Verda steleto (Torino), a 10 obměsíčníků nebo čtvrtletníků: Amerika e-isto (New York), Aŭstria e-o-revuo (Videň), British e-ist (Londýn), Die Weltsprache (Videň), E-Airut (Seinäjoki, Finsko), Helena e-isto (Athény), Hungara e-isto (Budapest), R. E. S. informa bulteno (Bukarest), O Brasil e-ista (Rio de Janeiro), Universala poŝtmarka revuo (Didcot, Anglie — esp., angl., franc.). — Vedle těchto tištěných (45) časopisů vycházejí litografované listy (8) čistě esperantské Irlando vokas (Dublin), La vivo (Heilo, Holandsko), Svisa espero (Bern), Unuiĝo (Lisabon), Dia regno (Leksand, Švédsko), i dvojjazyčné Monda bonvolservo (Windsor, Kanada, 14deník), Paco kaj justeco (Assebroek, Belgie), Ukraina e-isto (Schliessfach). — Kromě těchto 53 časopisů (asi třetina předválečného počtu) vycházejí ovšem četné svazové a spolkové věstníky více místního zájmu a významu (jako u nás La kulturo v Plzni a j.) i Aŭroro, list pro slepce Brailleovým písmem. —

Jak vidno, je veliký nepoměr v počtu časopisů, vycházejících v Evropě (45), Americe (5), Australii (2) a Africe (1), což jen zčásti lze vysvětlit tím, že ústřední orgány evropské jsou také pro ostatní světadily. Zvláště nápadné je, že ze všech časopisů, které kdysi vycházely v Asii (Japonsku, Číně, Korei a j.) nebyl dosud obnoven ani jediný — zřejmě politický neklid dusí tam ještě snahy kulturní. — Nejvíce esperantských časopisů vychází v Holandsku - 9, Francii - 5, Anglii - 4 a ve Švédsku - 4, nejméně v Československu, Rakousku, Belgii, Maďarsku, Bulharsku, Německu (po 2), Jugoslávii, Dánsku, Finsku, Norsku, Řecku, Irsku, Polsku, Rumunsku, Švýcarsku, Portugalsku, Itálii (po 1). — Tento stav (zachycený ke konci 1946) je daleko za stavem předválečným, takže ještě nutno velmi mnoho teprve doháněti. Jaké změny nastaly v r. 1947 ukazuje jednotlivě naše kronika a ukáže souborně přehled po ukončení roku. sb.

UEA (Universala Esperanto-Asocio) má dvě kanceláře: správní a organizační v Anglii (UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo) pro služby a redakční ve Švýcarsku (UEA, Palais Wilson, Genève, Svisujo). Předseďou je E. Malmgren (Stockholm), gen. sekretářem Cecil C. Goldsmith, redaktorem Hans Jacob (Ženeva). Oficiálním orgánem je měsíčník „Esperanto“. IEL měla koncem r. 1946 celkem 15.760 členů v 65 zemích (Anglie 2846, Francie 2511, Švédsko 1294, Holandsko 1146, Dánsko 1104, Jugoslavie 1090, Bulharsko 1070 atd., Československo — 422, čtyři sta dvacet dva). Místní zástupci a důvěrníci jsou v 1223 městech světa (v ČSR v 50 městech). Mezi 42 členy výboru jsou za Čechy dr. Stan. Kamarýt (Chotěboř) a J. Vondroušek (Brno), za Slováky A. Váňa (Žilina). Z 58 čestných členů jsou Češi Th. Čejka, Rud. Hromada, dr. Stan. Kamarýt, dr. Aug. Pitlík, O. Sklenčka, Julie Šupichová. Mezi 231 doživotními členy je Čech prof. Miloš Lukáš a americký Čech E. G. Šimonek (Berwyn, Ill.). Mezi 253 podpůrnými členy jsou z ČSR (8): K. Koutek, P. Šlechta, Č. Urban, F. Pytloun, M. Řehák, T. Balda, H. Michálek, J. Kořínek. Zástupcem a důvěrníkem pro ČSR je J. Sustr (Praha I, Benediktská 11). sb.

LKE (Lingva Komitato Esperantista v Hág) má po velikých ztrátách v posledních letech nyní pouze 48 členů (třetinu původního počtu). Mezi nimi jsou Češi R. Hromada, dr. Stan. Kamarýt, dr. Aug. Pitlík. sb.

Esperantisté od narození (děti, vychovávané od počátku dvojjazyčně, v jazyce mateřském a esperantu) jsou registrovány spolkem „Denaska esperantistaro“. Koncem r. 1946 bylo registrováno a kontrolováno 158 dětí z 22 zemí jako živé propagační doklady. sb.

Esperantské zprávy o ČSR pro dánské časopisy žádá Richard G. Nielsen, žurnalista, Herlufmagle, Sjaell, Dánsko.

Česko-esperantský slovníček (6.000 slov) vydáme jako přílohu našeho listu, abychom odpomohli aspoň největší nouzi, než bude možno vydati velký slovník. Přes malý rozsah bude velmi obsažný. Prvých 16 stran bude už v příštím čísle. Strany slovníku nebudou počítány do 12 stran jednoho čísla. Slovníček bude ukončen asi v 7 číslech. Nemůžeme však tuto přílohu dát členům ani předplatitelům zdarma. Prosíme proto všechny členy i odběratele, aby nám poslali složenkou na čís. pošt. spoř. 12.371 Svaz esper. ČSR Praha Kčs 15.— Kdo by si slovníčku nepřál, ať nám laskavě vrátí ty dva listy přílohy. Musíme skutečně šetřit s každým listem. Jsme přesvědčeni, že toto rychlé řešení slovníkové otázky najde všeobecný souhlas u všech samideánů. — Složenky budou přiloženy k příštím čísle. Cena 15 Kčs je snižená cena pro naše předplatitele.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze XIX, Uraiské nám. 9. Odpovědný za státní listy dr. Stan. Kamarýt. Ročně 70 Kčs s členstvím. Bez členství 60 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskárna «Cik» v Karl. Varech. Účast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt v Plzni č. j. I-Dob-2372-OB ze dne 13. III. 1947. Dohlédací poštovní úřad Karlovy Vary 1.